Karl Vanselow,

Niaj pensoj

Niaj pensoj en ĉi tiu
Horo danke turnu sin
Al la senmortulo, kiu
Tiel pliriĉigis nin.

Alt-anima, alt-spirita,
De la ter' irinta for,
Sed neniam forgesita,
Ni vin tenas en la kor',
Sur la vojo al la celo
Estu vi por ni modelo.

Senpaliĝa via nomo
Lumu en radia bril',
Estu ĝi de hom' al homo
De la koroj kunigil'.

Helpu nia kuna far',
Ke la ebligilo de l' kompreno,
Via lingva dono sen kompar',
Servu por eterna beno
Kaj feliĉo de l' homar'.

. . .

Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Karl Vanselow *(∗1877-03-20 – †1959-12-28).*

Arg-1057-2142 (2014-06-20 21:35:58)

Tiu ĉi originale verkita poemo troviĝas en la poem-libreto “Nia Lingvo Esperanto”, eldonita mallonge post la jaro 1945 en la tiama usona sektoro de Berlino, de Karl Vanselow, dua serio, unua kajero. Pri Karl Vanselow vidu la retejojn `http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow`*, ankaŭ:* `http://vanselow.wikispaces.com/`*.*